8(114)
2009

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO
Adreso por korespondi: ul. I.Krasickiego 18-20, PL 31-515 Kraków

Zbigniew Herbert

## Pan Cogito myśli o powrocie do rodzinnego miasta

Gdybym tam wrócił
pewnie bym nie zastał
ani jednego cienia z domu mego
ani drzew dzieciństwa
ani krzyża z żelazną tabliczką
ławki na której szeptałem zaklęcia
kasztany i krew
ani też żadnej rzeczy która nasza jest

wszystko co ocalało
to płyta kamienna
z kredowym kołem
stoję w środku
na jednej nodze
na moment przed skokiem

nie mogę urosnąć
choć mijają lata
a w górze huczą
planety i wojny

stoję w środku
nieruchomy jak pomnik
na jednej nodze
przed skokiem w ostateczność
kredowe koło rudzieje
tak jak stara krew
wokół rosną kopczyki
popiołu
do ramion
do ust

*Zbigniew Herbert*
*Pan Cogito , W-wa 1974*

## Sinjor' Cogito pensas pri reveno al la gepatra urbo

Se mi tien revenus
eble mi ekvidus
nek unu ombron de la hejmo mia
nek arbojn infanecajn
krucon kun fera tabulo
benkon sur kiu mi flustretis ĵurojn
kaŝtanarbojn sangon
nek ankaŭ unu aĵon kiu estas nia

ĉio kio saviĝis
jen platego ŝtona
kun kreta rondo
kaj mi staras ene
sur unu piedo
preta por elsalti

mi ne povas finkreski
kvankam fluas jaroj
kaj super mi bruegas
planedoj militoj

mi staras ene
monumente malmova
sur unu piedo
antaŭ salti en ekstremon
kreta rondo rufiĝas
kiel malnova sango
ĉirkaŭe kreskas montetoj
cindraj
ĝis ŝultroj
ĝis buŝ'

*Zbigniew Herbert*
*Sinjor' Cogito*

*tradukis. Lidia Ligęza*

# Krakova Societo Esperanto

## La programo de la renkontoj novembre

| | | |
|---|---|---|
| **04.11** | Lidia Ligęza<br>Bronisław Kieres | **Impresoj de la 94-a Universala Kongreso en Bjalistoko** |
| **18.11** | Andrzej Feuer | **La kanto, kiu alportadis feliĉon** |
| **25.11** | Janina Rżany | **Kion ni scias pri la natura, korka botelŝtopilo** |

## Elementaj informoj pri historia kaj nuntempa pola jura sistemo (2)

Aktivan elektorajton al Eŭropa Parlamento havas ĉiuj civitanoj de Eŭropa Unio, konstante loĝantaj en Pollando, kiuj en tago de elekto finis 18-an jaron de sia vivo.Tiuj, el ili, kiuj finis 21-an jaron de sia vivo, havas ankaŭ pasivan elektorajton al Eŭropa Parlamento.

Elektoleĝo al Sejmo kaj leĝo pri monprovizado de politikaj partioj efikas stabiligadon de politika sceno, kiel nomas tion tiuj, kiuj aprobas tiun staton. La kontraŭuloj nomas ĝin rokigado de politika sceno kaj asertas, ke tio kondukas al politika oligopolo, alidirite kuna monopolo de kelkaj partioj kaj restriktas rajton de elektantaro al libera elekto. Tiu temo tamen estas jam ne jura sed politologia problemo, do en tiu prelego mi nur signalas ĝin.

Projektoj de leĝoj akceptitaj per Sejmo devas esti akceptitaj ankaŭ per Senato. Se Senato proponas iujn ŝanĝojn en prezentitaj al ĝi projektoj, Sejmo povas akcepti ilin aŭ malakcepti. En kazo de malakcepto de decido de Senato estas en Sejmo necesa absoluta plimulto da voĉoj.

Prezidento posedas vetorajton kontraŭ leĝoj akceptitaj per Sejmo kaj Senato, sed Sejmo rajtas tiun veton forĵeti per 3/5 (tri/kvinona) plimulto de voĉoj. En aferoj speciale gravaj por ŝtato povas esti organizata tutlanda referendumo. Tiuj referendumoj estis organizitaj kun demando:"Ĉu vi akceptas novan Konstitucion?" en 1997 kaj kun demando: "Ĉu vi akceptas eniron de Pollando al Eŭropa Unio? " en 2004.

Registaro estas nomumita per Prezidento kaj devas esti akceptata per Sejmo, do per partio aŭ koalicio de partioj, kiu havas en Sejmo la plimulton de voĉoj. Tiu akcepto nomiĝas "ricevo de konfidvoĉo".

Ĝenerala konstitucia regulo, ke ekzekutivan povon plenumas prezidento kaj registaro, nepreciza difino de kompetencoj de prezidento kaj registaro kaj nepreciza dislimigo de ili, kiuj ekzistas en aktuala pola jura sistemo, kondukas al multaj konfliktoj inter prezidento kaj registaro, sed tiu problemo estas strikte politika, do en tiu prelego mi ne povas pli detale analizi ĝin.

Justicon plenumas Juĝoj kaj Tribunaloj. Ili estas regpovoj sendependaj de aliaj regpovoj. La sistemo de juĝoj ampleksas La Plej Altan Juĝon, ĝeneralajn juĝojn, administrajn juĝojn kaj militistajn juĝojn.

Pri konkordeco de leĝoj kun Konstitucio kaj inter si mem juĝas Konstitucia Tribunalo kaj, se ĝi konstatas, ke sejma leĝo ne konkordas al Konstitucio, Sejmo estas devigata adapti tiun leĝon al verdikto de Tribunalo. Se verdikto de Konstitucia Tribunalo konstatas, ke leĝo de plimalalta grado estas nekonkorda al aliaj leĝoj de pli alta grado, tiu plimalaltgrada leĝo perdas validecon aŭtomate.

Ĉiu, kiu opinias, ke liaj konstituciaj liberecoj aŭ rajtoj estis rompitaj, rajtas sub leĝaj kondiĉoj plendi al Konstitucia Tribunalo demandante pri konkordo de leĝo kun Konstitucio. Pri jura respondeco de plej altaj oficistoj en la ŝtato, ankaŭ pri jura respondeco de prezidento juĝas Tribunalo de Stato.

La sendependeco de juĝoj estas garantiata per sendependeco de juĝistoj, do per regulo, ke juĝistoj estas subordinitaj nur al Konstitucio kaj sejmaj leĝoj. Juĝistoj ne estas devigataj obei iujn ajn administrajn instancojn. Se juĝisto opinias, ke sejma leĝo estas nekonforma al Konstitucio, rajtas prokrasti sian verdikton kaj starigi demandon al Konstitucia Tribunalo.

Sendependecon de juĝistoj garantias ankaŭ reguloj, ke ili estas nomumitaj por periodo ĝis fino de 65-a jaro de sia vivo, kiam oni transiras al "stato de ripozado". Se pro stato de sano juĝisto ne eblas plenumi siajn devojn, povas transiri al "stato de ripozado" pli frue. Juĝistoj en stato de ripozado posedas

samajn privilegiojn, kaj ankaŭ samajn limigojn kiel juĝistoj aktivaj, nur ilia salajro estas tri kvaronoj de salajro de juĝo funkcianta aktuale je la sama posteno, el kiu juĝisto eliris al "stato de ripozado".
Juĝisto, kiu farus krimon, estus eliminita per verdikto de disciplina juĝo. Ankaŭ akuzo pri puninda faro aŭ malliberigo de juĝisto estas ebla nur kun konsento de disciplina juĝo. Juĝistoj ne rajtas esti membroj de politikaj partioj aŭ gvidi iu ajn ekonomian agadon, aŭ labori por salajro ekster juĝo, escepte de laboro kiel sciencisto en universitatoj.

Verdikto de juĝo povas esti ŝanĝita nur per verdikto de juĝo de pli alta instanco.
En aferoj punaj, civilaj kaj familiaj juĝas ĝeneralaj juĝoj. En ĉiu kazo ambaŭ flankoj de koflikto rajtas apelacii de verdikto. Pri krimetoj (alivorte deliktoj) - ekzemple malobeo al reguloj de trafiko, interalie stirado de auto, kiam stiranto havas en organismo alkoholon, sed malpli ol duono de promilo) kaj pri krimoj (ekzemple ŝtelo aŭ stirado de aŭto kun pli ol duono de promilo de alkoholo en organismo) en unua instanco juĝas distriktaj = kvartalaj juĝoj kiuj estas juĝoj de unua grado, pri krimegoj (ekzemple murdo) en unua instanco juĝas regionaj juĝoj (juĝoj de dua grado).

En aferoj civilaj ĝenerale kompetentaj estas juĝoj de la unua grado (distriktaj = kvartalaj juĝoj), escepte speciale gravaj aferoj, ekzemple aferoj pri defendo de aŭtoraj aŭ patentaj rajtoj aŭ senvalidigo de decido de kooperativo. Por tiuj aferoj kiel unua instanco kompetentaj estas juĝoj de dua grado (regionaj juĝoj). Juĝoj de dua grado (regionaj) funkcias kiel dua instanco por verdiktoj de juĝoj de unua grado. Por verdiktoj de regionaj juĝoj, funkciantaj kiel unua instanco, funkcias kiel dua instanco apelaciaj juĝoj.Eksterordinara kontrolilo de verdiktoj de dua instanco estas kasacio, kiun oni adresas al Plej Alta Juĝo. Motivo por kasacio povas esti nur fundamenta rompo de jura ordo.

Administraj juĝoj kontrolas konkordon de decidoj de administraciaj organoj kun jura sistemo. Administraj juĝoj ankaŭ estas duinstancaj.

*Bronisław Kieres*

La artikolo de d-ro Benedykt Wilkowicz
estis publikigita pollingve en: "Po Krakowie
i Małopolsce słownik krajoznawczy",
Kraków 2009, PTTK .

# La 70-a datreveno de eksplodo de la dua mondmilito (1)

La invado de hitlerana Germanio al Pollando septembre 1939 estis kontinuigo de aspiradoj flanke de germana nacionalismo al la konkeroj kaj la hegemonio en Eŭropo. Jam marte 1938 sekvis la aliĝo de Aŭstrujo al la germana Tria Regno, kaj unu jaro pli poste la anekso de Ĉehoslovakio. En la ultimato el la 21-a de marto 1939 pretigita al la pola registaro – Germanio postulis aliĝon de Gdansko al Tria Regno, plebisciton en Pomeranio, la senarmigon de duoninsulo Hel kaj la liberan transiton tra pola teritorio al Orienta Prusio. La 11-an de aprilo 1939 la kanceliero Hitler ordonis prilaboron de la plano pri agreso, unuflanke senvalidigis la deklaracion pri neagreso, subskribitan kun Pollando en 1934.

Celo de politiko de Tria Regno rilate al Pollando, formulita en parolado de Hitler al la superaj estroj de la germana armeo la 22-an de aŭgusto 1939 en Obersalzberg, estis likvido de la pola ŝtato, detruo kaj ekstermo de pola nacio.

La teritorio de Pollando en 1939 ampleksis 389 mil km$^2$, la longeco de teraj limoj 5,4 mil km kaj longeco de maraj limoj 140 km – en tio kun Germanio 2 mil km kaj kun Sovetunio 1,5 mil km.

Krom montoĉeno de Karpatoj sude kaj la marĉa zono oriente, la ŝtatlimoj ne havis naturaj baroj kaj estis malfacilaj por defendo. La loĝantaro de Pollando nombris ĉirkaŭ 35 milionoj, en tio ĉirkau 30 % estis la naciaj minoritatoj. La germana plano de agreso premisis la koncentran atakon el Orienta Prusio, Okcidenta Pomeranio kaj el Silezio direkte al Varsovio kaj venkobati la ĉefajn partojn de la pola armeo.

Ĝis 28.08.1939 Germanio koncentris ĉe pola limo 1,8 milionoj da soldatoj, ĉirkaŭ 11 mil kanonoj, 2,5 mil modernaj tankoj kaj 1,5 mil bonegaj aviadiloj. La germanan terarmeon komandis generalo Walther von Brauchitsch en du partoj: „Grupo de Armeo Nordo“ kaj „Grupo de Armeo Sudo“.

La unuan germanan ofensivon, kiu okazis la 1-an de septembro 1939 je la 4:45 komencis artileria atako de la kirasŝipo „Schleswig–Holstein“ al la pola milita magazeno Westerplatte. Komenciĝis la dua mondmilito, kiu en Eŭropo finiĝis nur maje 1945. Flanke de Pollando estis 900 mil soldatoj grupigitaj en 26 divizioj de infanterio, 8 brigadoj de kavalerio, 3 montaraj brigadoj, 1 brigado motorizita kaj 56 batalionoj de la nacia defendo, disponante 3 mil kanonoj, 475 tankoj kaj 400 aviadiloj.

La malamiko disponis multoblan superecon – precipe pro grandega forco kaj pro rapideco sekvanta de motorizado de la armeo. De 1-a ĝis la 6-a de septembro daŭris la ĉelimaj militaj agadoj, sed la polaj taĉmentoj kun gravaj perdoj devis retiriĝi direkte de la ĉefa defenda linio laŭ riveroj Narew, Wisła kaj San.

La dua etapo de la defenda milito daŭris de 7-a ĝis la 17-a de septembro, kiam la pola komandantaro, kalkulante je helpo de aliancanoj Francio kaj Britio, celis organizi la defendon laŭ tiuj riveroj. Tamen la okcidentaj aliancanoj ne montris aktivecon, kiu povus malŝarĝi la polan armeon. Komencon de la milita ofensivo ili antaŭvidis nur en 1940.

Laŭvican fazon de la defendaj agadoj komencis ofensivo de la armeoj “Poznań” kaj “Pomorze”, komanditaj de gen. Tadeusz Kutrzeba apud la rivero Bzura, kiu iom bremsis marŝon de la germanaj trupoj al Varsovio. Paralele kun bataloj apud Bzura proksimiĝis al fino defendaj bataloj de la marbordo. La 14-an de septembro falis Gdynia kaj finiĝis defendo de “Kępa Oksywska”. Duone de septembro estiĝis klare, ke la bataloj polaj-germanaj alportis al Pollando malvenkon. La ĉefaj partoj de pola armeo estis disbatitaj aŭ troviĝis en la malamika ĉirkaŭo, kiu formiĝis laŭ rivero Bug. La germana armeo praktike ekkonkonkeris la okcidentan kaj la centran Pollandon, sude ĝi okupis Przemyśl kaj proksimiĝis al Lwów, sed ĝiaj batalaj eblecoj estis grave malfortigitaj.

La 17-an de septembro okazis agreso el oriento. Sekve de la sekreta pakto subskribita la 23-an de aŭgusto inter la germana ministro de eksterlandaj aferoj J. Ribbentrop kaj sovetia ministro W. Molotov la Ruĝa Armeo grupigita en du frontoj kune pli ol 1 miliono da soldatoj – trapasis polan limon kaj komencis konkeri la orientan parton de Pollando. La sovetia agreso grave akcelis malvenkon de la pola armeo. Plimulto de polaj taĉmentoj, kiuj estis plu kapablaj al batalo ne povis jam evakuiĝi al Hungario kaj Rumanio. La pola armeo ĝenerale ne batalis kontraŭ Ruĝa Armeo, krom de taĉmentoj de la Korpuso por ŝirmo de limterenoj, kaj la heroa defendo de urbo Grodno. Post la sovetia agreso ne estis jam ebleco organizi polajn defendajn aktivadojn laŭ rivero Dniestr. Sekve de tiu ĉi milita situacio la Ĉefa Estraro de pola armeo kaj la pola registaro trapasis la rumanian limon. Tamen plu ĝis 27-a de septembro daŭris defendaj bataloj kontraŭ germana armeo en Varsovio, ĝis 29.09 batalis fortreso Modlin kaj ĝis 2.10 daŭris defendo de la fortika regiono sur duoninsulo Hel. En la lublina regiono batalis ankoraŭ apartaj grupoj de disbatitaj armeoj “Kraków” kaj “Lublin”. La lastan batalon faris la memstara operacia grupo „Polesie” komandita de generalo Franciszek Kleeberg inter 2-5. de oktobro 1939. La batalo finis la daŭratan dum 35 tagoj defendan militon de Pollando kontraŭ hitlerana Germanio.

Dum la tuta milito ĉe pola flanko pereis pli ol 66 mil soldatoj kaj 133 mil estis vunditaj. Krome 411 mil soldatoj trafis al la germana mallibero kaj 230 ĝis 250 mil al la sovetia mallibero.

La rumanian ŝtatlimon trapasis ĉirkaŭ 25 mil polaj soldatoj kaj al Hungario trapasis pli ol 50 mil. Perdoj de pola civila loĝantaro oni pritaksas je ĉirkaŭ 200 mil personoj. La germanoj perdis neplene 50 mil mortintoj kaj vunditoj, ĉirkaŭ 1000 tankoj kaj blenditaj veturiloj, 600 aviadiloj kaj multe da alia ilaro.

La septembra kampanio alportis al la pola armeo tutan malvenkon, kiu kaŭzis por Pollando perdon de sendependeco. La malvenko komencis la tragikan periodon en historio de pola nacio. Teritorio de Pollando konkerita de germanoj estis dividita je du okupaciaj regionoj. Spacon 92 mil km$^2$ oni aneksis al Tria Regno kaj sur 96 mil km$^2$ oni fondis t.n. Generalan Gubernion. Sub la sovetia regado troviĝis 201 mil km$^2$, loĝata per 13 milionoj da homoj, kiuj estis devigitaj alpreni la sovetian civitanecon. Okazis amasaj arestoj kaj deportadoj de pola loĝantaro al malproksimaj regionoj de Sovetunio. Dek miloj da loĝantoj estis mortpafitaj en Katinj, Mednoje, Ĥarkiv kaj en aliaj lokoj.

(finota)

*Benedykt Wilkowicz*
*tradukis: Zbigniew Duda*